



# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Februaro : 3 2022

## BARATA TRIBUNALO PROVIZORE MALPERMESAS LA UZON DE HIĜABO EN KLASĈAMBROJ

La Supera Tribunalo de la barata ŝtato Karnatako ĵus malpermesis al studentinoj uzi vestaĵojn kiuj povas esti konsiderataj kiel religiaj simboloj, inter ili la islama hiĝabo. Ĉi tiu malpermeso provizore daŭros ĝis la deklaro de definitiva juĝo kiu pritraktos ĉi tiun aferon.

Antaŭ kelke da tempo, grupo de islamaj virinoj prezentis plendon ĉe jura instanco, post la malpermeso uzi hiĝabon en la publikaj universitatoj de la ŝtato Karnatako, ĉar temis pri religia simbolo ene de klasĉambro. Laŭ la Organizaĵo de Islamaj Studentoj de Baratio, ĉi tiu malpermeso rompas la fundamentajn rajtojn de islamaj virinoj praktiki sian kredon, ankaŭ la rajton ricevi edukadon sen diskriminacioj.

La problemo komenciĝis kiam publika universitato en Karnatako malpermesis la uzon de hiĝabo en la universitato. Islamaj studentinoj protestis kaj tiam aliaj junulinoj ĉeestis la klasĉambrojn en oranĝaj vestaĵoj, tipaj en la hinda religio, por protesti kontraŭ la uzon de

religiaj simboloj fare de la islamaj kunulinoj. La krizo akriĝis kiam okazis disputoj inter sekvantoj de ambaŭ religioj.



Tiam, la Supera Tribunalo de tiu barata ŝtato petis al ĉiuj studentoj, sendepende de religiaj aferoj, ne uzi en la klasĉambroj hiĝabojn aŭ oranĝajn vestaĵojn, same ne montri religiajn flagojn aŭ afiŝojn, ĝis kiam definitive oni sciigos juĝon pri ĉi tiu temo.

Siafoje, reprezentanto de la islamaj studentinoj deklaris, ke la uzo de hiĝabo estas principo en sia kredo, do, ne temas pri libere elektable opcio. Krome, ŝi memorigis la baratan konstitucion, laŭ kiu oni povas sekvi libere kiun ajn religion.

# Vorto de la Semajno

**Akcio:** Frakcio de la kapitalo de financa societo aŭ industria entrepreno kies posedo rajtigas partopreni en ĝiaj proprietaĵoj kaj en ĝiaj profitoj.

Atesto pri tia partopreno, valorpapero.

**Akcia kompanio:** Komerca aŭ industria societo partoprenata de tiuj kiuj investis sian monon kaj kontraŭe ricevas profitojn per dividendoj. Akciaj kompanioj metas post sia nomo la mallongigon “A.K.”.

**Akciulo:** (aŭ “akciano”). Posedanto de unu aŭ pluraj akcioj en akcia kompanio. Normale, akciuloj, laŭ kvanto de akcioj, rajtas decidi pri la agadoj kaj estonteco de la kompanio.

## Tipoj de akcioj:

- *Unuopa Akcio:* temas pri akcio(j) posedata(j) de kiu ajn. Oni aĉetis ĝin en burso je kurzoprezo.
- *Nomumita Akcio:* temas pri akcio(j) posedata(j) de konkretaj homoj. La posedantoj de nomumitaj akcioj estas enskribitaj en akcian libron, tiel oni konas la akciulojn kaj ties proporciojn.
- *Ordinara Akcio:* tiuj akcioj posedataj de la fonditoj de la kompanio. Ili certigas la rajton decidi pri la demarŝoj de la entrepreno.
- *Privilegia Akcio:* ties posedantoj ofte ne rajtas decidi pri la entrepreno, tamen ili ricevas pli altajn dividendojn.
- *Ŝlositaj nomumitaj akcioj:* normale akcio povas esti vendata kaj aĉetata en burso, tamen kelkaj kompanioj decidas, ke tiuj aĉeto/vendoj povas okazi nur dum certaj kondiĉoj, kiel kunsento de la entrepreno, por eviti la aĉeton de tiuj akcioj, do la posedo de rajto por decidi pri la entrepreno mem, al nedeziritaj personoj, kiel konkurantoj.
- *Decida akcio:* (aŭ “ora akcio”). Temas pri nomumita akcio posedata de tiu kiu rajtas decidi en akcia kompanio sendepende de la ceteraj akciuloj. Tiuj decidoj ne temas pri normalaj kaj ĉiutagaj aferoj en la vivo de la entrepreno, sed pri konkretaj kaj ofte gravegaj temoj, ekzemple alprenotaj decidoj pri ebla kunfandiĝo kun alia kompanio.